

183  
STIFTO

**El la enhavo:**  
83-a UK en Montpeliero  
Slovakia E-Federacio  
Kluba agado  
Vojaĝo Sud-Amerikon  
Libroj  
Nia konferenco



**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



**La unua ĉeĥa UEA-estrarano P. Chrdle parolas kun UEA-prezidanto K. Enderby.**

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
aperas 6-foje jare. Abono 18 gld.

E-mail de Starto: starto@clavis.cz

TTT de Starto: www.clavis.cz/starto

E-mail de ĈEA: cea@tnet.cz

TTT de ĈEA: www.kuk.cz/cea/

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio,  
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por  
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla  
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%  
rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokategorioj: A 200 Kč, B 100 Kč, (C  
nuligita), D 50 Kč, E 50 Kč, F 4000 Kč, G  
130 Kč (Starto), N 20 Kč, eksterlandanoj 20  
ECU, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 335 Kč komencantoj,  
240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Esperanto, p.s.  
1069, 111 21 Praha 1

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6,  
152 00 Praha, tel. 02/5817732

Sekcioj de ĈEA: infana, junulara, skolta,  
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medici-  
na, scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-  
amnikara, de esperantaj-kolektantoj

Komisionoj de ĈEA: gazetara-informa,  
ekzamena

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA: 3330-021/0100,  
Komerční banka, Praha 2

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10,  
747 05 Opava, tel: 0653/611 823

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878,  
252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso  
02.9912126

Vicprezidanto: Věra Podhradská, Poříčí I, 603  
00 Brno, tel 05/4323 3047

Sekretario: Květa Krajičková, Esperanto, p.s.  
1069, 111 21 Praha 1

Komitato: Lucie Karešová, Tylova 1262,  
508 01 Hořice v Podkrkonoší

Komitato: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1,  
696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332  
278, fakso 0631/332 507

Komitato: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží

45/25, 736 01 Haviřov, tel 069/6815253

Kontrolgrupo de ĈEA: Jana Holcová,  
Sportovní 2723, 276 01 Mělník (membroj:  
Josef Hron, Libuše Krejčt)

Kontisto: Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147  
00 Praha, tel: (02) 4446 0162

Ĉefdelegito de UEA: Stanislava Chtdlová,  
Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel.  
02.9912201, fakso 02.9912126

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724  
0690

Lingva kontrolo: Miloslav Pastrňák

## Variabilní symboly pro platby ČES

- 311 expedice, úhrada koupených knih
- 604.2 písemné kurzy
- 604.3 předplatné Starto
- 604.5 předplatné Internacia Fervojojisto
- 668 dary svazu
- 694 členské příspěvky ČES
- 694.1 členské příspěvky UEA
- 789.1 sekce mládeže
- 789.10 sekce šachistů
- 789.11 sekce sběratelů
- 789.13 Sciencia revuo
- 789.15 ediční fond, Ringo
- 789.16 subkonta klubů mimo uvedených
- 789.17 Sekce nevidomých
- 789.19 Propagace v reg. tisku
- 789.3 sekce železničářů
- 789.7 sekce pedagogů
- 789.71 ILEI (+ Internacia Pedagogia Revuo)

Variabilní symbol uvádějte na přední straně  
poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do  
„Zprávy pro příjemce“ napište účel platby.  
Upozornění pro majitele účtů u jiných bank!  
Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte  
nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK  
PŘÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLMOUC  
apod. Zároveň uveďte i variabilní symbol.  
Dojde-li platba s označením „ČESKÝ ESPE-  
RANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme, kdo a  
proč platí. Takové úhrady účtujeme jako dary  
svazu.

ISSN 1212-009X

# 83-a UK MONTPELIERO 01-08 aŭgusto 1998



*KOKO estis nomo kaj simbolo de la montpeliera kongresa kuriero (en la lasta 5-a numero anstataŭigita per la birdo dodo). La kongreson eblis sekvi en Internet, de kie ni havas plejmulton de niaj informoj.*

## **Kelkaj bazaj indikoj:**

La lasta kongresano ricevis la kongresan numeron 3133.

Alta protektantino estis s-ino Marie-George Buffet, ministrino pri junularo kaj sporto. Mesaĝojn sendis Ĝenerala Direktoro de UNESKO, Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj Koffi Annan kaj Ĝenerala Sekretario de Internacia Organizo de Francilingvio Boutros-Boutros-Ghali (eksa Ĝenerala Sekretario de UN).

La salonoj ricevis nomojn de Roger Bernard, Paul Berthelot, Carlo Bourlet, René Centassi, Gabriel Chavet, Emmanuel Chicot, Stojan Ĝuĝev, Hector Hodler, Ivo Lapenna, Edmont Privat, Jeanne Roksano, Raymond Schwartz, Hippolyte Sebert, Carl Stop-Bowitz, Gaston Waringhien kaj kompreneble L. L. Zamenhof.

## **En la Internacia Kongresa Universitato aperis jenaj prelegoj:**

Antaŭparolo IKU (*Amri Wandel*)  
Interkultura komunikado (*Ilony Koutny*)  
Shakespeare-interlingvisto (*Humphrey Tonkin*)

Mediterraneaj silaboj (*Marc Van Oostendorp*)

Sociaj aspektoj en la epidemologio de la aperantaj infektaj malsanoj (*Jose Antonio Vergara*)

Ĉu ni estas solaj? (*Amri Wandel*)

## **Nova estraro de UEA elektita por la jaroj 1998 ĝis 2001:**

**Kep ENDERBY**, Aŭstralio: Prezidanto, Kunordigo, Eksteraj Rilatoj

**Renato CORSETTI**, Italio: Viceprezidanto, Kampanjo 2000, Landa Agado, Financoj

**Michela LIPARI**, Italio: Ĝenerala Sekretario, Junularo

**Petr CHRDLE**, Ĉeĥio: Faka kaj Scienca Agadoj, Instruado

**Kalle KNIIVILÄ**, Svedio: Informado

**Gbelo KOFFI**, Togolando: Afrika Agado, Kulturo

## Mozaiko de la 83-a UK



ĈEA-prezidanto kaj UEA-komitatano V. Kočvara dum la komitatokunsido



K. Kraft dum unu el la aŭtoraj duonhoroj en la libroservo prezentas la novan Ĉelian-esperantan vortaron



Novaj ĉeestantaj estraranoj de UEA dum la komitata traktado. De dekstre: M. Lipari, K. Enderby, R. Corsetti kaj P. Chrdle



Ripozante inter kunsidoj: ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio S. Chrdlová kaj ĈEA-prezidanto V. Kočvara.



Post la kunsido de esperantistoj-fervojistoj

Novaj honoraj membroj de UEA

Ses elstaraj Esperanto-agantoj estis distingitaj per honora membreco de UEA. Ili estas Andre Albault kaj Pierre Babin (Francio), Ignat Bociort (Rumanio), William R. Harmon (Usono), Claude Piron (Svislando) kaj Saburo Yamazoe (Japanio).



J. Rýznarová dum kelkaj horoj en Faka ĝiĉeto senlace informadis pri la Asocio de Esperantistoj - handicapuloj.

Afrikanano unuafoje en Estraro de UEA

En la nova Estraro aperas Gbego Koffi el Togolando (agado en Afriko). La elekto de Gbego Koffi estas historia, ĉar unuafoje afrika esperantisto okupas lokon en la „registaro“ de UEA.

Nobel-premio por William Auld?

Esperanta PEN-Centro proponas nian majstron por la fama premio por kutimigi la konceman komitaton kalkuli en la futuro ankaŭ kun verkistoj esperantistaj.

## Venontaj Universalaj Kongresoj de Esperanto:

La 84-a UK okazos en Berlino, en la plej granda kaj la plej moderna Kongresa Centro de Eŭropo, inter la 31-a de julio kaj 7-a de aŭgusto 1999. Mi atentigas ĉiujn interesatojn pri la partopreno, ke la plej favora aliĝperiodo finiĝas jam la 30-an de septembro 1998! Tial bonvolu ne tro longe heziti kaj kaze de via intenco partopreni tuj sendu al mi ajnan interessignon, surbaze de kiu mi sendos al vi aliĝilon kaj kondiĉojn por aliĝo kaj pago.

La 85-a UK okazos en Tel Aviv (Israelo) inter la 11-a kaj 18-a julio 2000 kaj la 86-a UK en la jaro 2001 en Zagrebo (Kroatio).

Stanjo Chrdlová  
Kongresa parantino por Ĉeĥio

## La Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo

La Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo (ankaŭ nomata La Faka Forumo) estas unu de brilaj iniciatoj de la UEA-prezidinto Lee Chong-Yeong, kiu enkadre de la ĉijara UK invitis reprezentantojn de ĉiuj Organizaĵoj, kiuj havas diversajn celojn, sed tamen unu komunan trajton, nome praktikan uzadon de Esperanto. Tiamaniere ili komune kreas la Esperanto-komunumon. Partoprenis la kunvenon reprezentantoj de pli ol 50 organizaĵoj.

Post la enkondukaj prelegoj de la UEA-prezidintoj Lee Chong-Yeong kaj Humphrey Tonkin kaj SAT-prezidanto Yves Peyraut sekvis vigla diskuto, kiu rezultis en provizoran rezolucion. Ĝi inter alie atentigas gravecon de Faka aplikado de Esperanto kaj en la movado, kaj en eksteraj rilatoj, esprimas komprenon, ke la penetrado en fakajn kaj sciencajn mediojn plialtigos la prestiĝon de Esperanto kaj

donas plurajn rekomendojn kaj sugestojn tiurilatajn.

La deziro de la ĉeestantoj estas kunlabori plu en la estonteco surbaze de egalrajteco por la komuna celo, ne serĉante ecojn, kiuj diversigas la unuopajn fakajn asociojn, sed male serĉante ecojn komunajn, por ke per komuna agado nia Esperanto-komunumo disvastiĝu kaj fortiĝu.

Evidente la kunveno montriĝis ne nur interesa, sed ankaŭ tre utila kaj mi strebos, ke ĝi jam fariĝu regula programero de la venontaj Universalaj kongresoj de Esperanto.

Petro Chrdle  
UEA-estrarano pri Faka kaj  
Scienca Agadoj

## Franclingva TV 5 informas pri Esperanto

Okaze de la 83-a Universala Kongreso de Esperanto en Montpellier aperigis la franclingva televida stacio TV 5 naŭpaĝan informon pri la Kongreso kaj pri Esperanto en sia teleteksto. La aŭtoro Martin Oesch unualoke prezentas unupaĝan informon pri la 83-a UK, sur la sekvanta paĝo koncize skribas pri la historio de Esperanto, parolante pri ĝi kiel pri la „lingvo naskiĝinta el la la domo”. Du paĝoj koncize prezentas la Esperantan gramatikon donante ekzemplojn kaj emfazante ĝian simplecon kaj senesceptecon. La restantaj paĝoj analizas la fakton kial la Lingvo, malgraŭ ke ĝi estas sendube avantaĝa kaj pli facile lernebla ol etnaj lingvoj, ĝis nun ne estis „unuanime” akceptita en la tuta mondo. La informon oni povas taksu kiel seriozan, kvankam la lastpaĝaj konkludoj-analizoj estus por la plejparto de esperantistoj eble „tro sobraj”.

Ni nur fine menciu, ke la televida stacio TV 5 estas „internacia”, t.e. celas ne nur Francujon kaj franclingvajn landojn, sed la tutan mondon, do ĝiaj informoj trafas konsiderinde vastas publikon.

zp

## Ni kongresumis en Montpelliero

La prezento de nova estraro, transdono de diversaj premioj, anonco de rezultoj de Belarta Konkurso, skiza tranigardo de IKU kaj fakaj programoj, aplaŭdoj, fema martelobato, himno, manpremoj, adiaŭo - jen la programo de solena fermo de UKO, kiun multaj el ni jam iomfoje travivis. Sarusimile finiĝis antaŭ kelkaj tagoj la 83-a kaj Montpelliero nun estas nur historio. Kia ĝi estis?

Kompreneble, preskaŭ ĉiam estas la ĵus finiĝinta kongreso la plej bona, des pli, ke inter sepdekkapa ĉeĥa partoprenantaro ne mankis tiuj, kiuj povis la riĉan kongresan programon ĝui plentempe kaj ne devis fone de ĝi deĵore ŝviti kiel antaŭ du jaroj. La 83-a kongreso fluis tute glate. La pitoreska historia urbo kun imponaj modernaj urbopartoj allogis pli ol tri mil kongresanojn - tiun superon de la Praga kongreso mi iom envias, sed al francaj kolegoj mi pri tio gratulas. La kongresanoj estis en la urbo ankaŭ multe pli videblaj ol en Praha - ja urbo estas kelkfoje malpli granda kaj ĉiuj koncentriĝis en ne tro vasta urbokerno. Ekde tiu ĉi kongreso komenciĝis ankaŭ nova funkcioperiodo en UEA. Mi restis en la komitato kiel komitatano A, en la estraron de UEA estis elektita Petro Chrdle, kiu nesukcesinta en la elekto de B-komitatoj fariĝis komitatano C kaj povis esti elektata en la Estraron, En la nova UEA-gvidorgano li respondecas pri faka kaj scienca laboro. Al lia nova grava posteno en nia monda movado mi kore gratulas - ja nia landa movado, ne blindiga, sed stabila kaj sistema, meritas

havi reprezentanton en la Estraro. Tamen mi iom bedaŭras tion, ĉar laborforto de nia nuna vicprezidanto mankas al ni en proksimaj jaroj. Respondema funkciulo - kaj Petro ja tia estas - devas nepre dediĉi al siaj taskoj en UEA plenan sian kapablon kaj tempon. Mi deziras al li sukceson en ĉiu direkto de sia agado, ĉar ankaŭ liaj rezultoj bildigas agadpovon de niaj esperantistoj. Sed mi ne plu prenu lokon por miaj personaj impresoj kaj opinioj el la kongreso kaj mi transdonu vorton al kongresaj dokumentoj.

Vi. Kočvara

### Rezolucio de la 83-a Universala Kongreso de Esperanto

„La 83-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Montpelliero, Francio, de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1998, kun 3.133 partoprenintoj el 62 landoj - salutante la 50-an datrevenon de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, kies respekto estis kaj restas esenca kondiĉo de la laboro por Esperanto, debatinte pri la nuntempaj ideoj kaj laboroj de interregistaraj kaj ne-registaraj organizaĵoj rilate edukadon al paco kaj al reciproka toleremo, kun aparta atento al mediteraneaj landoj,

- analizinte la kontribuadon de la Esperanto-komunumo, realan kaj potencialan, al tolerema, multkultura mondo, **Alvokas**

- al Unuiĝintaj Nacioj, al ties instancoj, kaj al ne-registaraj organizaĵoj, ke ili donu pli grandan atenton kaj serĉu eblan, solvon pri la problemoj de la lingva dimensio de Homaj Rajtoj. Tiu dimensio estas tro ofte preteratentata, kaj

tiel la homa rajto plene kaj sendiskriminacie kompreni kaj esti komprenata je internacia nivelo ne povas realiĝi.

- al UNESCO ke, kadre de ĝia Lingua-pax-programo, ĝi konsideru instruadon de Esperanto por eksperimenti ĝian valoron en la antaŭenigo de interkultura edukado.

- al la landaj kaj fakaj organizaĵoj de la Esperanto-komunumo ke ili intensigu en ĉi tiu spirito kaj en la kadro de la Kampanjo 2000 siajn klopodojn por meti la internacian lingvon Esperanto kaj ĝiajn valorojn je la servo de la evoluo de la nuna mondo en paco kaj toleremo."

#### Informoj el la komitato de ĈEA

Ĝuste antaŭ komenco de la somera feriosezono okazis la 27-an de junio komitata kunsido en Opava. La programo estis - kiel kutime - ŝtopita per problemoj de mastrumado, de eldonagado, oni traktis pri proksimaj esperantistaj renkontiĝoj de Esperanto-tago en Pardubice (19. 9.), jubileo de Esperanto-klubo en Pĕřov, Vina seminario (1.-4. 10.), KAEST Praha k.a. La ĉefpunkto, kiu pleje interesas nian membraron, estas ĉijara asocia konferenco. Estis traktitaj kaj solvataj ĉiuj necesaj detaloj - sed tion mi ĉi tie ne diskutu, ĉio grava estas en la aliĝilo, enmetita en tiun ĉi numeron de Starto. Por niaj membroj estas nur grava la atentigo: ne forgesu ĝustatempe aliĝi kaj pagi la kotizon. Krom konferenco estis ekstraktita ankaŭ la baldaŭa 9-a nacia kongreso (en 1999). Por ĝi estas serĉata konvena loko, la komitato preferus sudan Bohemion, jam naskiĝas la elekto-

komisiono. La prezidanto de ĈEA jam akceptas proponojn por statuto kaj kandidatigo de honoraj rekonoj por laboro en la movado.

Grava komitata decido tuŝas ĉiujn membrojn de ĈEA: post analizo de nia mastrumado, kiun daŭre malprofitigas inflacio, oni devis por la venonta jaro altiĝi membrototizojn en la asocio. Ĉar tio venas post kelkjara paŭzo, la altiĝo tamen ne plene kovras ĝeneralan inflacion, kiu en nia ŝtato estas ĉirkaŭ dek procentoj. La baza kotizo - do por kategorio A - estas ekde la nova jaro 200,-Kĉ jare. Aliaj membrototizoj pagas proporcie al tiu ĉi sumo. Mi scias, ke tiu decido iujn malkontentigos, sed ni ne havas alian eblon. La fakton, ke ekzistas inflacio, ni ne povas ŝanĝi, ni povas ĝin nur respekti.

La venonta kunsido de la komitato okazos en Praha fine de la aŭgusto.

vlko

#### ĈANTORYJA

ĉijaran renkontiĝon (21.6.1998) partoprenis 40 esperantistoj ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj, kies reprezentantoj parolis pri regiona kunlaboro. Venontjaran 75-an renkontiĝon ni volas festi per engravuro de E-simbolo en proksiman rokon. Pliaguloj kaj handikapuloj povas alveturi de la pola flanko per ŝnura fervojo, infanojn tie plezurigos metala tobogano.

- drkoĉ-



---

# La 6-a konferenco de ĈEA (16.-19.10.1998)

## Jablonec nad Nisou - koncize pri historio

Unua dokumento pri ekzisto de iu vilaĝeto Jablonec apud rivero Nisa devenas el la jaro 1356, sed dum la tuta mezepoka periodo estis nur sensignifa loko en vasta apudlima arbaro. Luzaciaj kontraŭuloj de ĉeĥa reĝo Jiří z Poděbrad (Georgo de Poděbrady) bruligis ĝin en la jaro 1496 kaj la sidejo rekreskis nur komence de 16a jarcento, kiam la postrestintajn ĉeĥajn loĝantojn anstataŭis germana koloniigado. Venis precipe spertaj vitrofaristoj el ercmontara regiono, kiuj trovis en tiu ĉi arbariĉa teritorio novan prosperon.

Tridekjara milito signifis denove multajn suferojn, nekatolikaj loĝantoj devis forlasi la landon kaj baldaŭ poste aĉetis la bienon Malá Skála kun Jablonec grafa familio Des Fours. Vitroindustrio sukcese disvolviĝis precipe ekde 18a jarcento. El tiu epoko devenas ankaŭ la unua el ŝtono konstruita preĝejo, konsekrita al sankta Anna. Aperis ankaŭ unuaj fabrikoj de bijuterio, kiuj rapide famiĝis. Sukceson havis multaj komercistoj, kiuj eksportis la varon tra tuta Eŭropo kaj eĉ trans la maroj. Laŭ imperiestra decido ricevis tiama vilaĝo en 1808 titolon de urbeto kaj rajton je regulaj merkatoj. Certan limigon por plua disvolvo kaŭzis dum la 19a jarcento granda distanco de fervojlinioj, sed tamen en 1866 imperiestro Francisko Jozefo I honorigis la urbeton per titolo urbo kaj samtempe ĝi fariĝis distrikto. Aspekto de la rapide disvolviĝanta industria centro ŝanĝiĝis. Kreskis novaj fabrikoj, palacoj de ŝtataj kaj kulturaj institucioj. Komence de 20a jarcento fine atingis la urbon ankaŭ fervojlinioj, kiuj ligis ĝin kun najbaraj industriaj centroj Liberec kaj Tanvald.

Post unua mondmilito sekvis unue granda prospero kaj poste ekonomia krizo, sed tamen el tiu periodo devenas impona palaco de nova urbodomo kaj katolika preĝejo. Ekde 1938 apartenis Jablonec al germana regiono de Sudetoj kaj suferis same kiel la tuta lando kaj Eŭropo. Unuaj paŝoj post 1945 ne estis facilaj, plejparton de germana loĝantaro anstataŭis ĉeĥaj alvenintoj. Malgraŭ ĉiuj ekonomiaj kaj politikaj problemoj kaj streĉoj dum sekvanta periodo ŝajnas, ke Jablonec havas nun novajn ŝancojn enpaŝi la trian miljaron.

-ek-



## **Kampanjo 2000 .**

Laborplano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio por la Kampanjo 2000 aprobita de la asocia komitato la 28-an de februaro 1998

### **1-a celo: Levi la organizan kaj idean nivelon de la membraro de ĈEA**

1. La komitatanoj vizitados lokajn klubojn por stimuli ilin al pli aktiva agado - minimume estos vizitotaj 10 kluboj en ĉiu jaro.

2. Al ĉiu regiona renkontiĝo de esperantistoj en Ĉeĥa Respubliko oni sendos reprezentanton de la komitato.

3. En la jaro oni reaktivigos la pedagogian sekcion de ĈEA. Oni daŭre zorgu pri bona laboro de la sekcio inkluzive de ĝia kunlaboro kun ILEI.

4. La asocio pere de la redaktoro de la asocia organo Starto aliĝos al la interreta sistemo.

### **2-a celo: Levi la prestiĝon de la internacia lingvo Esperanto**

1. Prepari kaj eldoni en periodo 1998-2000 jenajn materialojn:

a) Mezan vortaron ĉeĥan-Esperantan (en kunlaboro kun KAVA-PECH)

b) Ĉeĥlingvan prospekton pri Esperanto

c) Kolekton de interlingvistikaj studoj por ĉeĥaj fakuloj (elekto el Esperanta artikolaro)

d) Enĉeĥigi kaj kompletigi la biografian materialon „Kiu estas kiu en interlingvistiko“.

2. En komputila reto krei kaj kompletigadi www-paĝon, duflanke en Esperanto kaj en la ĉeĥa.

3. Enkomputiligi tradukojn el la ĉeĥa literaturo kaj disponigi ilin al interreta banko.

4. Renovigi la seminariojn pri aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko - la unuan jam en la jaro 1998 en kunlaboro kun firmao KAVA-PECH.

5. Traduki propagandajn kaj prilingvajn materialojn disponigitajn de UEA en la ĉeĥan kaj disvastigadi ilin

6. Plinombrigi kaj fortigi la asocian komisionon por preso kaj informado kaj taskigi ĝin per konkretaj taskoj kun celo levi la ĝeneralan konscion pri bezono de internacia lingvo kaj ebloj de Esperanto tiurilate.

### **3-a celo: Influi la internacian vivon**

1. Kontaktiĝi kun la nacia UNESCO-komisiono kaj regule ĝin informi pri atingiĝoj de nacia esperantista movado

2. Aliĝi al kultura programo „Prago-Eŭropa urbo de kulturo de jaro 2000“ kaj prepari renkontiĝon kun kultura programo meze de la jaro 2000.

3. En periodo 1998-2002 inviti almenaŭ unu internacian E-kongreson en nian landon.

## Kolokvo Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST):

Kiel ni jam sciigis al vi, inter la 13-a kaj 15-a de novembro okazos KAEST '98, kolokvo, kiu organizos en Prago Ĉeĥa Esperanto Asocio kiel sian kontribuojn al Kampanjo 2000, sub aŭspicioj de UEA kaj ISAE.

Ĝis nun jam aliĝis en la programon jenaj prelegantoj:

### Plenkunsido (Aplikoj de E-o en Scienco kaj tekniko (ĝenerale):

Z. Pluhař (CZ): Historio de seminarioj AEST  
P. Chrdle (CZ): Aŭtoraj rajtoj intemacie  
R. Sachs (DE): La krabo vivanta en arbo  
H. Werner (DE): Simetriaj poliedroj ĉirkaŭ ni  
H. Roessler (DE): Pri la teoremo de Pick

### Sekcio 1 (Modernaj rimedoj de komunikado: iliaj avantaĝoj kaj problemoj):

J. Vojáček (CZ): Komputiloj, Interreto, Edukado, Esperanto  
R. Foessmeier (DE): Aŭtentikeco kaj sekreteco en moderna komunikado  
F. Nitzsche (DE): Prevento de sanecaj perturboj sekve de ĉeekrana laboro  
L. Szilvási (HU): Digiĉa teknika E-Biblioteko  
M. Malovec (CZ): Komputiligo de libroj

### Sekcio 2 (Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto):

D. Blanke (DE): La rolo de planlingvoj ĉe la evoluo de terminologi-sciencaj konceptoj de Eugen Wüster (omaĝe al Eugen Wüster okaze de lia centjariĝo)  
J. Kavka (CZ): Natursciencaj terminoj en PIV (statistika sondado pri ties ĝusteco)  
W. Blanke (DE): Terminologia Esperanto-Centro: spertoj, problemoj  
V. Barandovská-Frank (DE/CZ): Observata evoluigo de plurlingva terminologio en novaj interdiciplinaj fakoj  
M. Bartovská (CZ): Brodvoj

### ATENTU!

Ankoraŭ eblas aliĝi! Kiel aŭskultanto aŭ kiel preleganto. Aliĝilo estas publikigita en la pasinta numero de Starto!

## KONCIZE EL ESPERANTUJO

- Nova brila disertacio. 15. 6. 1998 ĉe la Beletra Fakultato de la Universitato de Torino Federico Gobbo, 24-jara, tre brile diplomigis per disertacio pri „La dilemo de Esperanto inter helpfunkcio kaj civitanigo“.

- TEJO konkurso pri satiro estas destinita por maksimume 30-jaruloj. Necesas 4 ĝis 8 paĝoj origine verkitaj kaj senditaj ĝis 30. 10. 1998 al UEA, Nieuwe Binneweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

- Kvin novaj TTT-paĝoj en la interreto: [www.esperanto.nu/junforumo/](http://www.esperanto.nu/junforumo/); (junularo) [www.esperanto.nu/ttdisk/](http://www.esperanto.nu/ttdisk/). (diskutejo) <http://osiek.org/lagazeto/>. (La Gazeto) <http://www.esperanto.se/ek/> (klaĉejo) <http://esperanto.nu/lingvo/> (lingva konsultejo)

### - Estraro de Akademio

Geraldo Mattos estis elektita prezidanto de la Akademio de Esperanto per 27 voĉoj, kontraŭ 10 voĉoj por Perla Ari Martinelli. Christer Kiselman kaj Michel Duc Goninaz estus elektitaj vicprezidantoj kaj Renato Corsetti sekretario.

- UN asignis al UEA statuson de specialaj konsultaj rilatoj

- Biblioteka apogo Thorsen atendas subvenciojn ĝis 15.10.1998 al UEA en Rotterdamo

- TEJO-seminario: Lingvaj rajtoj - lingvo-politiko okazos inter la 11a kaj la 18a de oktobro en la Budapeŝta Eŭropa Junulara Centro

- Gvidlibron por krei fakvortojn laŭ ISO preparis TEC UEA en traduko de Sabine Fiedler kaj redakto de Wera Blanke.

- La kastelo Grésillon fermota - laŭ opinio de oficoj ĝi ne respondas al postuloj de sekureco, sed la kastelo ne havas monon por riparoj, tial la fama kulturcentro de esperantistoj estas minacita

- Esperanto en la telefonlibro en Budapeŝt, kie sur la p. 15. inter la fremdlingvaj ĝeneralaj informoj aperas ankaŭ la tutkolurna Esperantlingva teksto (krom la angla, germana, franca, itala kaj rusa).

- Nord-Amerika Kongreso de Esperanto okazis en Montrealo (24/28-a de julio 1998).

# EL LA VIVO DE CEA

## AŬTUNA KALENDARO

- 28.8. Jubileo de J. Babička, Praha  
11.-13.9. Paroligaj kursoj en Vracov  
19.9. XI-a Esperanto tago en Pardubice  
1.-4.10. X-a Vina Seminario en Lechovice  
2.-4.10. 11-a Kultura Festivalo en Ústí n.L.  
3.10. Renkontiĝo en Kladno  
16.-18.10. Konferenco de ĈEA en Jablonec  
13.-15.11. KAEST '98

## KLUBA VIVO

**40-jariĝon de Esperanto-Tendaro en Lančov** festis malgranda renkonto sabate la 18-an de julio en la tendaro. La feston partoprenis trideko da personoj, ĉe tosto parolis s-anoj P. Sittauer (historio de la tendaro, kunlaboro kun la vilaĝo Lančov, svazarm), J. Jičínský (rememoroj), Ing. V. Kočvara (40 jaroj da laboro), V. Podhradská (1955 Chvalatice), D. Kočvara (Kastoroj de silentado), Ing. M. Hlaváč (kastoroj de la naturo), J. Filip a M. Brátka (rememoroj), V. Hasala (ekudado de junularo), Suchánek (ekonomio). Dum 40 jaroj estis konstruita somera lernejo kun 37 kabanoj, ĉefa konstruaĵo kun kuirejo kaj kancelario. Nun estas rekonstruataj la higienaj ekipaĵoj.

Urbo Lysá nad Labem bonvenigis esperantistojn. La 6-an de junio 1998 kunvenis 30 AEH-anoj el Ĉeĥio kaj Kurt kaj Sylvia Langer el la germana Heidelberg en Lysá nad Labem. Partoprenantojn salutis vicurbestro Jiří Hálek. Renata Čančíková, direktorino de urba muzeo, prelegis pri laboro de orientalistoj d-ro Bedřich Hrozný kaj disdonis broŝuron pri lia vivo. Muzeo bedaŭrinde estis malfermita pro antaŭneloga vizito de ŝtelistoj, sed vidindaj estis ankaŭ la kastelo kaj ĝia parko.

(Laŭ B. Zubová)

## KAFEJO ESPERANTO

En 1966 ni unufoje kunvenis en „Kafejo Esperanto“. Tio estis antaŭ 32 jaroj, dum kiuj ĝi pruvis sian „vivkapablon“ malgraŭ oftaj malhelpoj. Do ek en la 33-an jaron!

Ni aŭdos kaj vidos en Národní dům, klubejo 6:

13.9.1998

13.00 UK en Montpellier - D. Kočvara  
A. Miluchová

11.10.1998

13.00 Arboj folihavaj - Ing. Z. Glajcar  
14.30 Svět je velký - Dr. J. Hromádka

8.11.1998

13.00 Ĉinio (video) - M. Volný

La 14.6.1998 prelegis en la Kafejo s-ano Miloslav Pastrňák pri la historio de Karola Universitato.

### Klub esperantistů v Praze

se po letních prázdninách opět pravidelně schází každou středu - od 9. září 1998 v Domě dětí a mládeže v Praze 4 - Opatově, Šalounova ul. 2024, vždy od 17.30 do 20.00 hod. Program schůzí zahrnuje informace o esperantském hnutí, opakování gramatiky, praktickou konverzaci, studium esperantské literatury a zpěv. Všichni záměmci jsou vítáni.

J. Patera

### ARANĜOJ

**XI-a ESPERANTO-TAGO** en Pardubice la 19-an de septembro 1998 de la 10.30 ĝis la 17-a horo en KULTURA DOMO DUBINA prezentos travivaĵojn de la partoprenintoj de UK en Montpellier, rakonte kaj ekrane, sekvos prezento de klubaj agadoj, muziko kaj tombolo. Interesatoj pri tagmezaj kolbasetoj bonvolu aliĝi per simpla poŝtkarto (Esperanto-klubo D-ro Schulhof, Na okrouhlíku 953/21, 530 03 Pardubice).

### JUBILEA

#### 10-a VINA SEMINARIO

okazonta 1.-4.10.1998 en Lechovice invitas ĉiujn amantojn de bona vivo kaj amika kolektivo sub devizo „oni drinkas ne por fali, sed por suprenleviĝi!“ partopreni mallongajn prelegojn kun praktikaj gustumekzercoj pri distingado de vinvarioj, pri societaj reguloj de ĝusta vin-konsumado, pri ŝaŭmvinoj, tokajvinoj kaj pri arto drinki sen ebriiĝo. Plie vin atendas spektaklo pri preparado de miksitaj drinkaĵoj, faka ekskurso al vinberĝardeno kaj vinproduktejo, vizitoj de Znojmo kaj kastelo Mikulov. Loĝado en dultitaj ĉambroj kun duŝejo/WC en klasika ĉevalbieno. Aliĝojn akceptas: Jana Burianová, Renneská 35, 639 00 Brno, tel. 05-43243774.

#### RENKONTIĜO EN Kladno

##### kun ekskurso al Lány

sabate la 3-an de oktobro 1998 je la 11-a horo en klubejo de TEC - ul. gen. Klapálka 2258 (unua etaĝo) en Kladno. Post trarigardo de TEC-biblioteko kaj la muzeo de ŝtalo ni forveturos buse je la 14.30 h al Lány, kie ni metos bukedon al la tombo de familio Masaryk kaj rigardos tilion, kiun en 1994 plantis AEH en la parko. Aliĝojn akceptas (ĝis 5.9.1998): Stanislav Štefan, Vítězná 2955, 272 04 Kladno.

## Pozvánka na 6. konferenci Českého esperantského svazu

Vážení přátelé,

výbor Českého esperantského svazu (dále jen ČES) v souladu s plánem činnosti svolává ve dnech 16.-18. října 1998 svou 6. konferenci. Místem konání je Střední odborné učiliště bižuterní, Smetanova 56, Jablonec nad Nisou. V budově učiliště bude probíhat páteční a sobotní program, veškeré stravování a ubytování.

Ubytování ve 2-3 lůžkových pokojích s příslušenstvím.

Stravné zahrnuje páteční večeři, v sobotu snídani, oběd, večeři a II. večeři, nedělní snídani pouze pro ubytované. V době podávání jídel a při sobotní taneční zábavě bude otevřen bufet (nápoje, saláty, zákusky).

Všechny ceny jsou shodné pro tuzemské i zahraniční účastníky.

Předběžný program:

**pátek** příjezd, večeře, beseda s účastníky 83. UK

16.10.

**sobota** dopoledne i odpoledne pracovní část konference

17.10. večer taneční zábava s tombolou

**neděle** kulturně-turistický program

18.10. (návštěva Sklářského muzea.....)

Během konference budete mít možnost zakoupit esperantské zboží v Libroservu ČES.

Libroservo bude na konferenci výhradním prodejcem, pokud si přejete nabídnout k prodeji svoje E-předměty, pak pouze jeho prostřednictvím.

Neesperantské zboží nebude dovoleno prodávat.

Vkládání reklamních materiálů do tašek pro účastníky a jakákoliv další propagační činnost jsou možné po předchozí dohodě s výborem ČES.

Taktéž budete moci na místě zaplatit členské příspěvky ČES, ČEJ, UEA a předplatné esperantských časopisů.

Uvítáme příspěvky do tomboly.

**Přihlášky** posílejte pokud možno do **20. září 1998** (rozhoduje datum poštovního razítka) na adresu **Český esperantský svaz, pošt. sch. 1069, 111 21 Praha 1** Současně prosím odešlete příslušnou sumu za účastnický poplatek a objednané služby. Čestní členové účastnický poplatek neplatí.

**Stornovací poplatky:** při odhlášení do 10. října 1998 (dle poštovního razítka) Vám bude odečteno 10% ze zaplacené částky na nezbytné náklady, po tomto termínu 50%.

Vaše případné dotazy ráda zodpoví Věra Podhradská, tel. 05-4323 3047 (večer).

Těšíme se na shledanou v Jablonci.

ing. Vlastimil Kočvara, v.r.  
předseda ČES

## Trafikaj informoj

1. Integrovana stredni skola bižuterni - SOU BIŽUTERIE, Smetanova ul. 66  
ASOCIA KONFERENCEJO - enirejo, akceptejo

2. Jablonec n. Nisou, **hlavní nádraží** - ĉefa stacidomo de fervojlinio Liberec-Tanvald. (Atentu, la antaŭa haltejo havas surskribon *Jablonec n. Nisou, dolní nádraží* = malsupra stacidomo). Laŭ sagoj vi atingos dum 3-5 minutoj la haltejon de aŭtobusoj n-ro 1, 10, 12. U GYMNAZIA, direkto urbocentro kaj sekve pluen al Mšeno aŭ Janov n. N. Biletan kun pluspago eblas aĉeti de ŝoforo, entute Kč 8.-.

Celo: haltejo *Horní náměstí* (Supra placo) aŭ *U přehrady* (Ĉe akvobaraĵo) - de tie laŭ sagoj. Vidu (6), (7).

3. *Autobusové nádraží, Jablonec n. Nisou* - aŭtobusa stacidomo.

A: Laŭ sago tra strato *Lipanská* al *Dolní náměstí*, Malsupra placo, kiun regas la turo de la malnova urbodomo. Tie estas haltejo de supremenciitaj aŭtobusoj 1, 10, 12. Biletajn po 6.- Kč eblas aĉeti en kioskoj de jumalvendejoj. Celo: la unua haltejo *Horní náměstí* aŭ la tria *U přehrady* (6) (7).

B: Piede eblas atingi la konferencejon dum proksimume 15-20 minutoj, sekvante la stratojn *Tržní*, laŭ parkejo, *Mostecká*, *Mlýnská*, *Pod Skalkou*, *Mánesova* kaj *Smetanova*. Parte la direkton sekvas ankaŭ aŭtobuslinio n-ro 4.

4. Haltejo de aŭtobusoj (MHD) n-roj 1, 10, 12, direkto urbocentro kaj sekve al *Mšeno*, *Janov n. N.* Pluaj atentigoj vidu sub informo (2).

5. Haltejo de aŭtobusoj n-ro 1, 10, 12 - *Dolní náměstí*, placo de la malnova urbodomo. Pluajn atentigojn vidu sub informo (3).

6. Haltejo de aŭtobusoj n-roj 1, 10, 12 - *Horní náměstí*, ĉe katolika preĝejo. De tie piede laŭ sagoj tra stratoj *Palackého*, *Mánesova* kaj *Smetanova*, proksimume 10 minutojn.

7. Haltejo de aŭtobusoj n-roj 1, 10, 12 - *U přehrady*, ĉe akvobaraĵo. De tie iom reen laŭ sagoj tra stratoj *Palackého*, *Mánesova* kaj *Smetanova*. Ankaŭ proksimume 10 minutoj, same kiel de haltejo *Horní náměstí*.

8. Alveno per aŭtomobilo de la direkto el Praha, Turnov tra urbeto Hodkovice. Ni rekomendas sekvi la stratojn *Turnovská*, *Pražská*, *5. května*, *Mostecká*, *Mlýnská*, *Pod Skalkou*, *Mánesova*, *Smetanova* - laŭ sagoj. Pri taŭga parkejo ni informos post alveno en la akceptejo.

Se vi ne volas uzi la aŭtoŝoseon el Turnov, direkto Liberec, eblas veturi tra vilaĝoj Jenišovice, Frýdštejn, Dalešice, Maršovice. Post alveno al Jablonec vi sekvos la straton *Pražská* kaj pluen same kiel en informo en antaŭaj linioj. Krome vi ĝuos belan panoramon de Ĉeĥa Paradizo kaj Jizera montaro.

9. Alveno per aŭtobuso n-ro 1 el fervojstacio Rychnov u Jablonce n.N. Aŭtobushaltejo estas antaŭ stacidomo. Necesas aĉeti por ĉiu persono 2 biletojn po 6 - Kč en aŭtomata kaso ĉe elirejo. Eventuale kun pluspago de ŝoforo. Celo: haltejoj (6) aŭ (7) - *Horní náměstí* aŭ *U přehrady* kaj poste laŭ sagoj tra stratoj *Palackého* kaj *Mánesova* - proksimume 10 minutojn.

10. Alveno per aŭtomobilo de la direkto Liberec. Sekvu la stratojn *Liberecká*, *Rýnovická*, *Větrná*, *Palackého*, *Mánesova*, *Smetanova* laŭ sagoj.

Informservo funkcios ekde vendredo la 16an de oktobro 1998 matene dumnokte. Telefono n-ro 0428-24258.

# Závazná přihláška na 6. konferenci Českého esperantského svazu

Jablonec nad Nisou, 16.-18. října 1998

Příjmení.....Jméno..... Titul.....

Adresa vč. PSČ.....  
.....

Telefon vč. p ředčísí.....E-mail.....

rodné číslo..... číslo OP.....

číslo legitimace ČES (pokud jste členem) .....

**Přihlašuji se závazně na 6. konferenci ČES. Prohlašuji, že jsem si pozorně přečetl(a) pozvánku a souhlasím s podmínkami pořadatele.**

**Objednávám a současně platím následující:** (zakřížkujte žádané)

**Kompletní pobyt** - 2x nocleh se snídaní, pátek večere,  ano  ne  
sobota oběd, večere - 470,- Kč  ano  ne

**Pouze stravu**, bez ubytování a snídaní -190,-Kč  ano  ne

## Účastnický poplatek

jsem členem ČES a platím do 20.9.1998 -100,-Kč  ano  ne  
po tomto termínu - 200,- Kč  ano  ne

nejsem členem ČES a tedy platím 200,- Kč  ano  ne  
po termínu 20.9.1998 - 300,-Kč  ano  ne

**Dar svazu** ..... Kč.....

**Celkem platím**..... Kč.....

**Datum**..... **Podpis**.....





## 11-a Internacia Kultura Festivalo en Ústí nad Labem 2. - 4. oktobro 1998

Vendrede vin atendas interkona vespero en la restoracio „LEV“ kun komuna vespermanĝo, sabate prelega kaj diskuta matineo, sankt-venceslaa ekumena vigilio sub devizo de interkonfesia toleremo kaj kanta-deklama vespero omaĝe al Jiří Kořínek kaj d-ro Tomáš Pumpr. Dimanĉe trajna ekskurso al Roudnice kaj la mita monto Říp. Aliĝkotiĝo, ekskurso, manĝo, loĝado sume 495 Kč. Skribu ĝis 15-a de septembro 1998 al s-ino Marie Moučková, Koštov 110, 400 04 Trnlice.

### INFANOJ

#### Ĉeĥaj infanoj vizitis Oostende

De la 6-a ĝis la 14-a de junio 12 junulinoj kaj 3 plenkreskuloj el Česká Třebová, Ĉeĥio, restadis en Oostende, Belgio, „urbo ĉe la maro“. En la grupeto estis „malnovaj vojaĝantinoj“ Jana, Katka, Iva, Šárka, Klárka kaj Bára, kiuj pasintjare vizitis Francion, Pollandon kaj Anglujon. Kun ili veturis ses pli junaj infanoj de 9 ĝis 11 jaroj el Brandýs kaj Opatovice.

La iniciato originis pasintjare en

Romo, dum jara kunveno de katolikaj esperantistoj. Flory Witdoeck, vic-prezidanto de loka grupo La Konko tie renkontis pensiitan instruistinon Zdenka Novotná, kiu gvidas kant- kaj dancgrupeton.



Estis serĉataj gastfamilioj, estis kontaktitaj lernejoj, ĵurnalistoj kaj oficialuloj. . . Por faciligi la kontaktojn la vizitontoj ricevis liston kun utilaj frazoj en Esperanto kaj nederlanda lingvo, kun prononc-indikoj.



Dum la semajno okazis prezentoj en kvar bazlernejoj en Oostende kaj unu mezlernejo en Brugge.

Esperanto bone funkciis kiel inter-lingvo, eĉ en lernejoj, kie la internacia lingvo estis tute nekonata...

Kvankam la ministerio pri instruado subvencias multajn internaciajn interŝanĝojn, tia interŝanĝo ĉeĥa-Esperanta ne estis subvenciebla.

Eble surbaze de tiu sukcesa eksperimento la ministro adaptos sian starpunkton?

(Laŭ Raymond Wylleman kaj Zdenka Novotná)

### TEJO-premioj al Okříšky

En la desegno-konkurso de TEJO por infanoj sukcesis du knabinoj el Okříšky, kiuj ricevis siajn premiojn de la portugala TEJO en Lisbono: la unuan premion (250 DM) de la antaŭlerneja aĝo ricevis Pavla Vrtalová por la desegno „Feliĉa familio“, la unuan premion (300 DM) en la kategorio 11-15 jaroj ricevis Monika Pacholíková por la desegno „Amikoj el la tuta mondo“. En la elementa lernejo de Okříšky laboras jam plurajn jarojn interesrondeto Esperanto.

### Ekzamenoj de skoltoj

La 24. 6. 1998 submetiĝis al ekzamenoj buŝa kaj skriba 6 infanoj el skolta taĉmento de Krmelín. La ekzamenintoj Pavel Jarolím, Gustav Heczko kaj Drahomír Kočvara

transdonis al la infanoj diplomojn de EK Ostrava Vítkovice kaj havigis al ili adresojn de eksterlandaj junaj esperantistoj. La taĉmento ricevis grupan leteron el Kanado.

## POŝTAJOJ

### Nia Esperanto 111-jariĝas

Pri nia datreveno informas ankaŭ ĉeĥa poŝto en Strážnice per porokaza afrankmaŝinstampilo (26.7.-31.8.1998), aŭtorita de inĝ. ark. Karel Kuĉa kaj gravurita de s-ro Karel Pavlíček. Ambaŭ kreis novan kliŝeton ankaŭ por EK Třebíč, kompreneble ĉio laŭ iniciato de V. Hasala.



### Printempa konferenco de la fervojistoj

„Laŭ spuroj de la ĉevaltracia fervojo Budweis - Linz“ (24/26-a de aprilo 1998) en la sudĉeĥa urbeto Velešín. Partoprenis kvardeko de ĉeĥaj kaj aŭstriaĵ fervojistaj esperantistoj, inter ili kiel honora gasto ankaŭ PhDr. Anna Abelovská, el Ĝenerala Direkcio de ĈD, la sekretario de la ĉeĥa LA de FISAIC.



## JUBILEOJ

95 jaroj

ZAHRADNÍK KAREL, PRAHA 1

90 jaroj

BABIČKA JAROMÍR, DOBŘICHOVICE

ŠIMEK JOSEF MUDr., RTYNĚ V P.

ŠTĚCHOVÁ JANA, PRAHA 4

85 jaroj

STŘELBA ANTONÍN, ČESKÁ LÍPA

UHLÍKOVÁ MARIE, BRANDEJS N. L.

80 jaroj

JANOUŠ FRANTIŠEK, RUMBURK

75 jaroj

BLÁHOVÁ EVŽENIE, PRAHA 4

GATTERMAYEROVÁ DANUŠE KROMĚŘIŽ

HOLUB VLADIMÍR, LICHNOV

KŘÍŽOVÁ ANDĚLA, ZLÍN

KUNÁTOVÁ HELENA, PARDUBICE

ŠTĚPÁNOVÁ VĚRA, ŠLUKNOV

WAGNER ANTONÍN, LIBICE N. C.

70 jaroj

HAEBERLEOVÁ GLADYS, BRATISLAVA

HRŠEL ZDENĚK, BRNO

HRUŠKOVÁ JANA, ČESKÁ TŘEBOVÁ

HÁVA BOHUSLAV, LIBEREC

MILUCHOVÁ AMÁLIE, ORLOVÁ-LUTYNĚ

NIEMCOVÁ ANNA, STONAVA

RYBÁČEK MIROSLAV, OPAVA 5

SVOBODOVÁ VĚRA, TŘEBÍČ

ŠILHANOVÁ ZDENA, ŠTERNBERK

ŠVACHOVÁ MARIE, ŠTÍTNÁ NAD VLÁŘÍ

ZEDNÍKOVÁ SOŇA, PRAHA 2

60 jaroj

HANZLÍKOVÁ JANA Ing., PRAHA 4

HEJHAL JOSEF, SEPEKOV

HRBÁČEK VÁCLAV, MLADÁ BOLESLAV

MINÁŘOVÁ MARIE, SVITAVY

PETRÁŠ ČESTMÍR, ŠTRAMBERK

POLSTER FRANTIŠEK, STRÁŽNICE

SKOUMAL FRANTIŠEK, BLUDOV

SMOLÍKOVÁ ANDĚLA, OSTRAVA-DUB.

SUSTER JIŘÍ, BRNO

ŠVEJDOVÁ MÁRIA Ing., BREZNO

50 jaroj

BLAŽEK KAREL Ing., PRAHA 4

BRABLECOVÁ BOŽENA, DOTOPLAZY U  
OLOMOUCE

ČERVENKA JARMIL, ČEBIV

FORSTEROVÁ MARIE, Kladno 2

HAKLOVÁ VĚRA, MOCHOV

HECZKO GUSTAV, OSTRAVA-DUBINA

HUMPOVÁ JAROSLAVA, TRHOVÉ SVINY

KYZLINK JAROMÍR, BLANSKO

PETERA JOSEF, Kladno

VRABCOVÁ MARIE, JABLONEC N.N. 4

### 90 jaroj de Jaromír Babička

Grava kaj honora membro de IFEF, s-ano Jaromír Babička, ĝisvivis la 8-an de aŭgusto 1998 sian 90-jariĝon. Niaj fervojistoj festos lian jubileon vendrede la 28-an de aŭgusto je la 13-a horo en saloneto de la Praga ĉefstacio kaj invitas ankaŭ ceterajn esperantistojn, kiuj volas gratuli. Aliĝu ĝustatempe, ĉar la saloneto havas 54 sidlokojn, kaj pagu 160 Kč por manĝo: solena tosto (Becher-likvoro), tagmanĝo, trinkaĵo kaj kontribuo por la solena torto. En studenthejmo eblas sekurigi por vi tranoktadon por 250 Kč en unulita ĉambro aŭ 200 Kč en dulita por unu nokto. Sabate sekvos promeno tra Prago sub ĉiĉerona gvido de Stanjo Chrdlová. Aliĝojn akceptas: Mirka Kovaříková, podatelna, Hlavní nádraží, 120 00 Praha 2. Gratulojn al la jubileulo eblas sendi al adreso: Jaromír Babička, Na Skalkách 146, Lety, 252 29 p. Dobříchovice.

## Korespondi deziras

### Homido

Mia nomo estas Homido Tohirov (viro). Mi naskiĝis en Pengikento (Taĝikio) la 12-an de marto 1977. Antaŭ unu jaro mi partoprenis kurson pri Esperanto, plie mi ŝatas okupiĝi pri sporto kaj legado (de noveloj kaj romanoj). Mi volas korespondi kun komencantoj el via lando.

Tohirov Homid  
<homido@td.silk.org>

*Rim. red.: Se iu volas respondi, sed ne havas aliron al Internet, skribu al la redaktoro de Starto, kiu forsendos vian leteron.*

**Pri Karateo** En nia urbo ekzistas homo, kiu posedas batal-/lukt-/art-lernejon (t.n. karate-o) kaj deziras kontakti homojn tra la mondo, kiuj havas la saman ŝatokupon. Eventualaj informontoj sin direktu (hispane, angle aŭ Esperante) al jena adreso: s-ro Gerardo Cantore, Villegas 815, (8300) Neuquen Capital, Argentina, telefono: 054-099-472303., e-mail: shinshin@karate.teletel.com.ar. kun kopio al <neuquen@esperanto.nu>.

Ruben Sanchez

### Universitata E-klubo

E-klubo „Pacifiko“ ĉe For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato kun studentoj kaj instruistoj de diversaj fakultatoj serĉas kontaktojn al multaj aliaj universitate funkciantaj E-grupoj kaj kluboj. Leteroj estas atendataj ĉe For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato, FOŜTU 10, ul. Puŝkinskaja, RU-690600 Vladivostok, RUSIO, rete: esper@pub.marine.su

## Gazeto Komencanto

Gazeto por komencantaj esperantistoj kaj komencantaj aŭtoroj, fondita en 1992, redaktata de Viktor Vasiljeviĉ Kudrjavcev (8 numeroj jare) estas abonebla por 361 Kč ĉe Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel./fakso 0631/332 507, e-mail: jede\_slovacko@iol.cz.

## La manoj de Goljato



estas poemo de Miloš Horanský, kiun li verkis en 1968 sub pseŭdonomo Jan David pri la soveta okupacio de Ĉeĥoslovakio. Nun la poemo en traduko de Jana Cíhová aperis en Internet (www.clavis.cz/starto) kun afabla konsento de la aŭtoro, kiu al ni skribas sian saluton:

*Estimataj geamikoj,  
permesu al mi tiel alparoli vin, kvankam ni konas nin reciproke nur pere de afablaj najbaroj Schäffer, sed via partopreno en „enesperantigo“ de La manoj de Goljato tion al mi ebligas. Mi dankas pro la plezuro, per kiu vi pridonacas min - precipe kiam mi imagas la kulturitan kaj tiom vastan familion de esperantistoj kaj la amatajn „Goljateojn“ inter ili.*

*Kun respekto kaj amika saluto  
Miloš Horanský  
(Jan David) 10.7.1998.*

# NIAJ NAJBAROJ

## La 1-a kongreso de Slovakia Esperanta Federacio

La 30-an de majo 1998 okazis en Košice la 1-a kongreso de Slovakia Esperanta Federacio - SKEF. Ĝi aliĝis al fonda kongreso de SKEF en 1997, kiu okazis en Pribylina en hotelo Esperanto, kie estis ankaŭ aprobita kaj akceptita Statuto de SKEF. La 1-an kongreson ĉeestis 51 delegitoj-esperantistoj. Malformis ĝin s-ano Milan Zvara kaj poste sekvis Esperantista himno kaj poemo de Zamenhof *La Vojo*. En la nomo de E-klubo Ostrava salutis la kongreson s-ro Vladimír Sládeček.

Slovakia Esperanta Federacio nuntempe koordinas kvar regionajn organizaĵojn:

- ERS: Esperanto-regiona societo  
sidejo Poprad
- ESO: Esperanto societo  
sidejo Bratislava
- MEL: Mezslovaka Esperanto Ligo  
sidejo Žilina
- OSSES: Okcidentslovakia Esperanto societo  
sidejo Trnava

Dum la kongreso estis elektita nova estraro:

- Prezidanto: Ing. Ján Vajs  
Vicprezidantino: Mária Tomašovičová  
Sekretariino: Katarína Bodnárová  
Kasistino: Ing. Katarína Puchá  
Membro: Milan Neubeler  
Revizoro: Mária Belánová

La sidejo de la Federacio estas: SKEF, Sobotské nám. 36, 058 01 Poprad

La ĉefaj taskoj akceptitaj por la jaroj 1998-2001:

- Propagandi Esperanton en slovakia medio kaj informadi pri nia Esperanta agado eksterlande

- Revivigi pedagogian sekcion de SKEF, aktive instrui Esperanton, organizi novajn kursojn, plialtigi la lingvosciojn.

- Eldonadi necesajn esperantajn publikaĵojn

- Krei hejman paĝon de SKEF en interreto kaj regule ĝin aktualigi

- Ĉiujare eldoni ĝis fino de septembro la kalendaron de esperantaj aranĝoj por la venonta jaro.

La kongreson solene fermis ĝia nova prezidanto s-ano Ján Vajs. Ni ĉiuj deziras, ke la taskoj, kiujn akceptis kaj aprobis la partoprenantoj de la kongreso, estu dum sekvaj tri jaroj plenumataj kaj tiel Esperanto denove trovu en Slovakio firman lokon.

Mária Tomašovičová

## RENDEVUO de UZANTOJ kaj PRAKTIKANTOJ de ESPERANTO

okazas en Gliwice (13-15.11.1998),  
Pollando.

Aliĝilojn oni akceptas ĝis 31.10.1998 je la adreso: ESPERANTO, PL 44-101 Gliwice, skr. poczt. 21. Aliĝkotizo 20 nzl, manĝo kaj tranoktoj 90 nzl.

## 78-a Germana Esperanto-Kongreso

Inter la 28-a de majo kaj la 1-a de junio 1998 okazis en Freital apud Dresdeno la 78-a Germana Esperanto-Kongreso, kiun partoprenis pli ol 170 esperantistoj. La plej multnombra eksterlanda grupo estis tiu de Ĉeĥio kaj kio laŭ mi gravas, estas, ke ĉiuj ĉeĥaj esperantistoj aktive kontribuis al la programo. Oficialajn salutvortojn nome de Ĉeĥaj esperantistoj dum la jarĉefkunveno de GEA prezentis vicprezidanto de ĈEA Petro Chrdle, kiu ankaŭ prelegis pri siaj spertoj kun profesia uzado de Esperanto. Zdenka Novotná helpis kun prizorgo de infanoj, Josef Kříž prezentis videofilmon pri ekologia temo el la ĉirkaŭaĵo de Ústí kun komentario en Esperanto, la nelaciĝanta biciklisto Oldřich Schwetter, kiu, kiel kutime, venis el Havířov al la kongresejo en Freital perbicikle, rakontis tie pri siaj travivaĵoj de esperantisto-biciklisto, Stanjo Chrdlová instruis la bazan ĉeĥan kaj komune kun la aŭtoro Benoit Philippe prezentis novan libron de la eldonejo KAVA-PECH „Badenlanda legendaro de la Konstanca Lago“. Al la kultura programo kontribuis per kantado Miroslav Smyčka akompanata de Jan Zimmel. Dum la jarĉefkunveno krom kutimaj raportoj ekestis vigla diskuto pri utileco aŭ neutileco de du apartaj kajeroj de Esperanto Aktuell (en Esperanto kaj en la germana). Oni ne venis al iu konkludo, tial la GEA-estraro estis taskigita okupiĝi pli profunde pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la lingve apartaj kajeroj kaj raportoj al la

membraro decidcele post unu jaro, dum la venonta jarĉefkunveno. Ĝin organizos GEA dum la UK en Berlino.

*Petro Chrdle*

### Duvoluma registro pri

## der esperantist

La revueto „der esperantist“ estis la organo de la Esperanto-asocio en Germana Demokratia Respubliko (GDR), kiu aperis kun entute 164 kajeroj (80% en Esperanto) de 1965-1990. La revueto precize reflektis la movadon en GDR sed ankaŭ enhavis aparte multajn kontribuojn pri la movado en la orienteŭropaj landoj. Krome enestis multe da prilingvaj kaj interlingvistikaj / esperantologiaj materialoj kaj multaj korespondanoncoj (entute el 60 landoj). Duvoluma registro (A 4, po 120 p.), verkita de Ino Kolbe kaj Linde Knöschke malfermas la riĉan materialon. Ĝi entenas ampleksan tem-indekson, kaj jenajn aliajn indeksojn: gazetaro de GDR pri Esperanto, Esperanto-revuoj, landoj, GDR-esperantistoj, esperantistoj el FRG kaj el aliaj landoj, personoj neesperantistaj, elekta bibliografio de artikoloj el „der esperantist“ kaj de la aparte luksaj GDR-eldonoj de „Paco“ (1966-1989). La du kajeroj kostas po 20 DEM resp. po 25 guldenojn kaj haveblas ĉe Detlev Blanke (Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, blanke.gil@berlin.snafu.de ) aŭ ĉe UEA.

# LIBROJ LIBROJ LIBROJ

## Joseph d'Arbaut La besto de Vakareso



Libro aperinta en 1926 de Joseph d'Arbaut (1874-1950) en la okcitana aperas nun en Esperanta traduko de Jean-Luc Tortel kiel la plej freŝa eldonaĵo de KAVA-PECH Dobřichovice, 1998, 96p, 20cm.

La rakonto nin venigas en la provencan pejzaĝon Vakareson en la 15-a jarcento, kiam simpla taŭrogardisto travivas hororan aventuron kun mistera mitologia besto parenca al Pajno aŭ Faŭno, kies vizaĝo elrigardas el la vepro, kiel ni vidas sur la koverto. La stilan majstrecon de la verko la tradukinto transdonas en sufiĉe alta kvalito kaj pravas elastecon de nia lingvo per bildigoj proksimiĝantaj al la originalo pli fidele ol en nacilingvaj tradukoj.

## LA NOVA REALISMO

de *Bruno Vogelmann* (eldonita fare de *Kava-Pech* en 1997) estas verko ne nur leginda, sed zorge pripensenda. Ĝi plenas de originalaj ideoj, pli eble perspektivaj (futurologiaj) ol realismaj. (Ekz. aserti sur p. 52, ke „la tempo de la regado de dogmoj kaj ideologioj estas pasinta“, signifas prezenti tipan deziran pensadon.) Kelkloke temas eĉ pri ĉarme spekulativaj vizioj, kiuj havas nenion komunan kun realismo en la konvencia vortosenso. (Ekz. sur p. 72: „Eble la homa spirito elmigros el la homa korpo por serĉi pli evolukapablan loĝejon.“)

Aparte interesa estas la bibliografio, al kiu la verkinto multloke referencas. Ĉi-okaze iom embarasa estas la cirkonstanco, ke preskaŭ sole germanlingvaj fontoj konsistigas la liston. Vane mi serĉis tie almenaŭ unu franclingvan verkon de *Pierre Theillard de Chardin*. Kiel jezuito, li profunde sin dediĉis al paleontologia esplorado. Ĉar la evolu-teorion de *Charles Darwin* li klopodis serioze akordigi kun la kristanismo, maljuste „draŝadis“ lin teologoj unuflanke, materialistoj aliflanke. Al simila sorto sendube riskas elmetiĝi ankaŭ *Vogelmann*, interalie pro sia opinio, ke Kristo ne intencis fondi eklezion. Estante nek teologo, nek historiisto, ĉu mi aŭdacu diveni, kion Kristo (mal)intencis? Sed la kristanaj teologoj povas facile kontraŭargumenti: „Vi estas Petro (la roko), kaj sur tiu ĉi roko mi konstruos mian eklezion...“

Tamen, ne pri aferoj, por kiuj mi ne sentas min esti kompetenta, mi deziras

skribi ĉi-loke, ĉar unuavice interesas min la lingva verkoflanko, kiun mi konsideras bonega kaj kiu donas al mi veran ĝuon. Ĝi kapablas servi kiel modelo, ĉu el la vidpunkto gramatika, ĉu el la stila.

Mi, la fama „terminologia ĉasisto“, sukcesis kapti sole kelketon da diskutindajoj.

1. La verbo „kogni“ ŝajnas fremdi al la spirito de Esperanto. Analoge al la precedenta (kvankam neoficiala, tamen vaste uzata) PIVaĵo agnoski (latine *agnoscere*) pli konforma estus kognoski (latine *cognoscere*, itale *conoscere*). PIV registras ankaŭ, kiel apartan radikon rekognoski kun la referenco al skolti. Tamen, ĉi tiu verbo estas kodigita termino de geodezio. Resume, la supra novismo „kogni“ apenaŭ havas ŝancon establiĝi kiel termino gnozeologia, dum por la uzo laika nepre sufiĉas la fundamentaĵo (ek)koni.

2. Embarasas min ankaŭ la formoj „materiismo“ kaj „ideismo“ (ekz. p. 20), rekomendataj fare de PIV anstataŭ la kodigitaj filozofiaj terminoj materialismo (trovebla sur p. 63) kaj idealismo. Ĉi-okaze *Vogelmann*, kvankam lojala al PIV, subkonscie inklinis al la termino internacia. Aŭ ĉu temis pri misatento, ĉu pri komposta eraro? Similan problemon de manio trotaksi eblojn de planlingvo, mi tuŝis (STARTO, 1998, 2, p. 5-6), kritikante „ekzistadismon“ anstataŭ la laŭnorma: ekzistencialismo. Esperanto nepre ne fariĝu ĉifra por la sciencistoj.

3. Same dubinda estas la duopo „organa“ (ekz. p. 21) kaj „neorgana“ (ekz. p. 43), aplikata anstataŭ organika, neorganika (la lasta sur p. 48). La biologoj distingas: unuĉela organismo (t.e. organika estaĵo) ne havas organojn, sed organelojn (organo-idojn). Por la supre menciita adjektivo organa, PIV prezentas taŭgan ekzemplon: organa malsano, t.s. malsano de organo,

dum organika ĥemio ne rilatas al organoj.

4. Pri la fonetike malfeliĉa neoficialaĵo „procezo“ mi estas skribinta jam antaŭe (STARTO, 1990, 6, 26-27). *Vogelmann* uzas ĝin en la komencaj partoj de la verko (ekz. p. 28, 29, 32). Aliloke (ekde p. 38) li turnis sin al la fonetike pli taŭga: proceso. El la vidpunktoj logika kaj stila, oni bonvenigus konsekvencajn aplikadon de unusola vortformo por la nocio nepre identa.

5. Sed tio jam apartenas al la sfero de redaktado kaj kompostado. Mi devas laŭdi, ke da tiaspecaj eraroj troviĝas malmulte (ekz. p. 48 „evoluitaj“ anst. „evoluintaj“, p. 77 vivo devas „fini“ anst. „finiĝi“).

Epiloge: Neniu esperantisto, interesata de religio, filozofio kaj scienco, devus preterlasi trastudon de la unika verko el la plumo de *Vogelmann*, eldonita danke al *Kava-Pech*.

Prago 13. 6. 1998 Josef Kavka

## RIKARDO ŜULCO KAJ LUNO

Komence de januaro mi eksciis el Heroldo, ke mortis Rikardo Ŝulco, t.e. Richard Schulz. La datoj de lia naskiĝo kaj morto ne troviĝas en la nekrologo, mi scias nur tiom, ke li estis jam altaĝa pensiulo, gimnazia instruisto. Li forte engaĝiĝis en la aktivecoj de la Eŭropa Klubo kaj fariĝis profesoro en la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), San Marino, kaj en ties Arta sektoro kaj en ĝia Humanistika Sekcio. Li eldonis plurajn librojn pri Esperantaj temoj, en lingvoj germana kaj en E, kaj li havis originalajn pensojn pri tio, kiel E devus aspekti - sub influo de la Analiza Skolo. En Starto 4/1987 mi kritikis lian verkon *Pledo por unueca lingvo*, kaj li poste sendis al mi kelkajn siajn librojn.

En „*der esperantist*“ 130/2/1985 mi trovis poemeton fare de germana poeto Christian



Morgenstern (1871-1914) - laŭ R. Ŝ. „Kristiano Morgenŝterno“, el kies verkoj estas eble la plej konataj la „Pendumilaj lidoj“<sup>1)</sup>, kiujn R. Ŝ. esperantigis. Jen ekzemplo de lia traduko:

Ne estas luna ŝanĝ' kaprico.  
Ĝi ŝanĝas nome pro ofico.  
Kaj dilatante kaj cedante,  
prezenti sin laŭ-Esperante.  
Formante D-on kaj C-on formante,  
kaj tiel ĉiun tuj helpante.  
Farante tion, la trabanto  
deklaras sin por Esperanto.

Al tio aldonas d-ro Detlev Blanke: „Ŝulco kreive novkreas en la spirito de Morgenstern, bele montras la poemeto.“ Kaj mi aldonas, ke la originalo estas prezentita. Ke ĝi ne mencias E-on, estas certe klara. Laŭvorta traduko: „Kiam la Dio formis la karan Lunon, / li donis al ĝi tiun taskon: / Ĉe dilatado kaj ĉe cedado / akomodigi al germanaj legantoj, kreante A kaj Z - / por ke neniu sin parvenu sentu. / Sekve, la trabanto fariĝis komplete nova objekto.“

La poemo en la Esperanta traduko mencias, kion faras la Luno, kiam ĝi „Dilatas“ kaj kiam ĝi „Cedas“. En la ĉeĥa ni havas por tio la vortojn „Dorŭstá“ kaj „Couvá“.

Koncerne la laŭdon de d-ro Blanke, mi aldonas eldiron de angla poeto kaj verkisto William Somerset Maugham (1874-1965): „Virino bela kaj fidela estas tiom unika, kiel perfekta traduko de poeziaĵo. Traduko ordinare ne estas bela, se ĝi estas fidela, kaj ne estas fidela, se ĝi estas bela.“

1) Lido laŭ PIV: germaa popola lirikaĵo aŭ kanzono.

Adolf Staŭnura

## Novaj libroj en Esperantujo

El gravaj verkoj de mondliteraturo aperis ĉijare ĉe UEA:

La morto de Ivan Iliĉ de L. Tolstoj, tr. V. Melnikov, 53p, 6gld.

Ivan la malsaĝulo de L. Tolstoj, tr. V. A. Ŝrikov, 77p, 13, 80 gld

La Senĉesa rakonto de Michael Ende, tr. W. Diestel, 366p, 42gld

Elegioj de Tibulo, tr. G. Berveling, 76p, 10,80gld

Fulmotondro de Cao Yu, tr. Liu Caisheng, 135p, 27 gld

Sunleviĝo de Cao Yu, tr. Tan Xiuzhu, 142p, 27 gld

La Gnomo de G.A. Bécquer, 17p, 6,60gld  
Kiel ŝtalo estis hardata de N.Ostrovskij, tr. S.I.Cins, 367p, 30gld

Leteroj el mia muelejo de A. Daudet, tr. W.T.Oeste, 41p, 13,20gld

Ruĝdoma sonĝo III de Cao Xueqin, tr. Xie Yumin, 627p, 60 gld

Tereza Desqueyroux de F. Mauriac, tr. G. Labasthe, 78p, 13,50gld

La dua invado de marsanoj de A. kaj B. Strugackij, tr. M. Bronŝtejn, 111p, 12gld

La fora ĉielarko de A. kaj B. Strugackij, tr. M. Bronŝtejn, 130p, 15gld

Antologio latina, tr. G. Berveling, 576p, 75 gld

La ĉashundo de la Baskerviloj de A.C. Doyle, tr. W. Auld, 173p, 18 gld

La kamaradaro de Petro Nodeto de M. Lovrak, tr. J. Pleadin, 125p, 21gld

Mirindaj aventuroj de metilernanto Ilapiĉ de I.Briĉ-Mažuraniĉ, 180p, 16,50gld

La Rabeno de Beĥaraj/La rabeno de Bacherach de H. Heine, tr. L.L.Zamenhof kaj R. Hauptenthal, 104p, 19,80 gld

Sanga nupto de F.G.Lorca, tr. M. Fernández, 118p, 15 gld

# La ekspedicio en Sudan Amerikon

*Al partoprenintoj de la 81-a UK en Praha estis enmanigita kolora informilo pri preparata ekspedicio, kiun planis kelk-persona amatora kolektivo el Opava kun celo pli profunde konatigi la sudamerikan kontinenton al ĉeĥaj interesatoj. La ekspedicianoj intencis uzi krom aliaj ankaŭ servojn de Esperanto, ĉar unu el la grupo apartenis al aktivaj samideanoj kaj pluaj du tiucele ekstudis la lingvon.*

*Kio okazis plu kun tiu ambicia plano?*

*La starton de la ekspedicio unue forŝovis nesufiĉaj financoj kaj poste subita grava akcidento de unu el la ĉefoj, kiu povintus plenumi funkcion de doktoro de la grupo. Meze de la pasinta jaro la eksterordinara inundo „forportis“ tutan posedaĵon de membro-esperantisto de la grupo, kiu pro tiu kaŭzo devis tute cedi de la ekspedicio. Ankaŭ la plua membro - potenciala esperantisto forfalis. Malgraŭ ĉiuj obstakloj la ekspedicio tamen realiĝis en iom malampleksigita dimensio. Jen ni alportas plumraporton, kiun al Starto disponigis la ĉefkuracisto de Ŝtata Psikologia Hospitalo en Opava MUDr. Pavel Hlavinka.*

(kov)

La celo de la unua etapo de tiu ĉi ekspedicio estis konatiĝi kun suda Ameriko. Sub faka egido de Palacký-Universitato en Olomouc kaj Universitato de Ostrava, plue de Náprstek-Muzeo en Praha, Nacia Muzeo en Praha, Silezia Landa Muzeo en Opava, fako por sampatrujanaj kontaktoj de ĉeĥa ministerio por eksterlandaj aferoj kaj kelkaj aliaj subtenantoj ekvojaĝis la kvar membroj (el originalaj ses) la 30-an de oktobro 1997 por kelkmonata migrado. En la karavano

membris doc. PhDr. Ivo Barteček CSc., Jiří Blata - la estro de la karavano, doc. PhDr. Jaromír Pavlíček CSc kaj mi. Malĉeestis, bedaŭrinde, bonega esperantisto, komputila fakulo kaj kameraisto ing. Jiří Caletka.

Al ekvojaĝo antaŭis serĉado de kontaktoj kaj rekomendoj al ĉeĥaj eksterlandaj konsulejoj, ĉar oni intencis ligi kontaktojn kun ĉeĥaj eksterlandaj komunumoj, esplori ties bezonojn kaj nuntempan staton. Al pluaj taskoj apartenis kontaktiĝi kun esperantistoj, dokumenti la mondan kulturan heredaĵon (World heritage) en koncerna mondoparto kaj studi naturajn kaj historiajn memordaĵojn.

La ekspedicio aĉetis kaj preparis specialan terenan aŭtomobilon, kiun ĝi je 4 semajnoj pli frue enŝipigis kaj sendis al la haveno Puerto Cabello en Venezuelo. Malgraŭ helpemo de la ĉeĥa ambasadoro en Venezuelo estis posta elŝipigo tre komplika, finance pretenda kaj daŭris multajn tagojn. La sudamerika realeco ja estas tia - tamen dum plua vojaĝado, ĉe limpasejoj, en montaroj kaj prearbaroj nian ekspedicion akompanis bonŝanco.

La unuan monaton ni travivis en Venezuelo, unue pro elŝipigo, poste pro konatiĝo kun la marbordo kaj kun venezuelaj Andoj, kies pinto estas Piz Bolívar (5007 m.s.m.). Tiun ni vidis nur el profunda valo, tamen la unuaj sudamerikaj montoj estis ĉarnaj, la valoj vere puraj kaj montaraj centroj bone ekipitaj.

Kolombio estas priskribata kiel riskema lando, en kiu batalas pri potenco por-registaraj kaj kontraŭregistaraj militfortoj. Ties rivaleco nin feliĉe preterpasis kaj ni povis observi belajn montarajn pejzaĝojn

alternantaj kun historiaj lokoj. La ĉefurbo Bogotá akceptis nin tre afable inkluzive de ĉeĥa ambasadoro inĝ. Zelený, kiu aŭtoris kelkajn publikaĵojn kaj estas honora indiana tribestro

Ekvadoro estis la unua vere indiana lando, kiun ni vizitis. Ĝi estas ĉarma vulkana regiono, en kiu nin interesis nacia parko Cotopaxi kun sannoma vulkano (5.897 m.s.m.). Allogis nin ankaŭ la vulkano Chimboraso, la ĉefurbo Quito kun riĉe ornamitaj preĝejoj kaj ankaŭ pitoreskaj indianaj vilaĝetoj.

La enveturon en Peruo komplikis eta pasporta manko, pluajn problemojn ni ne havis. La duonemilitista movado „Hela pado“ kaj Tupec Amaru estas nuntempe en defensivo. Ili nun regas jam nur malgrandan teritorion kaj fremda veturilo ne vekis ties intereson. Peruo estas arkeologia trezorejo de Sud-Ameriko. Estas tie ĉi antaŭ-kolombaj kulturoj (Chan) kun piramidoj kaj interesaj ceramikajoj, memorajoj el regno de Inkaoj kaj barokstilaj orumitaj preĝejoj el hispania kolonia epoko. Ni vizitis iaman ĉefurbon de la Inka-regno Cuzco-n, la misteran kultejon Macchu Picchu (2.800 m.s.m.) kaj ni enakviĝis en la lago Titicaca. Malpli al ni plaĉis la Pacifika marbordo pro malfacilaj baneblecoj kaj malpureco. Nazca, karakteriza per grandaj dezertaj figuroj kuŝas ĝuste apud la transamerika aŭtostrado kaj la oraj trezoroj de Inkaoj nun troviĝas en ormuzeoj.

Bolivio ŝajne estas la malplej riĉa lando kun gravaj problemoj pro drogoj, sed ĝi havas superban pejzaĝon de altebenaĵo kun karakterizaj indianaj vilaĝetoj. Por ni ĉi tie iomete mankis pli da bolivia muziko. Eble ni ne havis bonŝancon ĉeesti iun karna-

valon, je kiuj la lando abundas.

El plua lando - Argentino - ni konas nur ĝian nordan parton kie ni atingis nian altecorekordon - la aŭtomobilo troviĝis antaŭ Nevada d'Acax en alteco 4.895 m kaj ni mem en 5.600 m. En ebenaĵa parto Chaco gastigis nin sampatrujanaj komunumoj en Prezidentia Roquez Saenz Panc kaj ni ĝuis lokajn specialaĵojn en manĝaĵoj, trinkaĵoj kaj dancado.

Paragvajo montris al ni sian afablan vizaĝon - ĝi estas lando de agrabla klimato, moderaj prezoj kaj alloga akvofalo Iguasu. Ĝi kuŝas sur la landolimo kun Brazilo kaj Argentino kaj ĝi apartenas al veraj mirakloj de la Tero.

Brazilo estas moderna kaj dinamika, plena de novaj aŭtomobiloj, farmaoj kaj belegaj arkitekturajoj. Amazonio kun la urbo Manaus nin bonvenigis per kamavalo kaj tropikaj pluvegoj.

La lasta lando en nia vojaĝ-ŝnuro estis denove Venezuelo kun orinoka ĝangalo kaj kun belaj strandoj.

Esperantistoj nin bonvenigis en Caracaso - prof. J. Bachrich, nur kontaktiĝis en Prezidentia Roq Saenz Pens en Argentino. Ni havis adresojn de samideanoj ankaŭ en Brazilo, Bolivio kaj Peruo. Eble pro nia tasko preferi kontaktojn kun niaj sampatrujanaj, kiuj nin plurloke atendis kaj pri kies vivo ni devontigis nin informi publikon, ni ne sukcesis uzi pli vaste la afablan esperantistan sudamerikan reton. Certe venontokaze, inkluzive de Bona Espero, kiun ni pretervojaĝis je kelkcentkilometroj.

La Sud-Ameriko ĉesis por ni esti nur sonĝo. Ĝi fariĝis efektiveco, kiu nin ne seniluziigis, sed male vastdimense pliriĉigis.

Opava, aprilo 1998. P. Hlavinka



Odesílatel:

Český esperantský svaz  
ESPERANTO, p. s. 1069  
111 21 Praha 1  
**Internet:** cea @ tnet. cz  
www.kuk.cz/cea  
☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (29. ročník)  
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto  
Členská evidence a změny adres: Květa Krajíčková, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (29-a jarkolekto)  
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio  
Abonprezo: 16 gld  
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio, e-mail: starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto  
Presis: OPATISK Opava

Podávání novinových zásilek povoleno  
Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,  
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

ISSN 1212-009X

# **NOVINOVÁ ZÁSILKA**

**Poštovné hrazeno v hotovosti  
u pošty 746 01 Opava 1**